





tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

oktobro 2013 / n-ro 119



-  Urbestro Milan Bandić invitis Universalan Kongreson de Esperanto al Zagrebo
-  Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Rijeka de la 6a - 12a de julio 2014
-  Mortis D-ro Ivo Borovečki
-  Esperanto Somerumado ĉe Adriatiko

Jam jarfino ne malproksimas. Someraj memoroj plue varmigas nin.

Dankon al multaj gratulintoj okaze de la eniro de **Kroatio** en **Eŭropan Union**. Specialan dankon al esperantistoj el **Berlino** kiuj la 3-an de julio 2013 okazigis apartan perdistancan Skype-kunsidon kun kroataj esperantistoj. Pri Esperanto en Kroatio parolis al berlinaj esperantistoj **Spomenka Štimec** kaj **Zlatko Tišljar**.

La titolpaĝa foto de tiu ĉi numero de **Tempo** venas el **Rejkjaviko** el la fotilo de **Francisco L. Veuthey**. La foto prezentas unu el la plej fascinaj kongresejoj de la mondo, la islandan operejon kaj kongresejon **Harpan**. Dudeko da kroatoj partoprenis en la 98a Universala Kongreso de Esperanto en **Islando**. Kun ni dum kelkaj tagoj kongresis ankaŭ direktorino de **Turisma Asocio de la Urbo Zagrebo Amelija Tomašević**. **Islando** unikis pro la specifa lando-gastiganto. Impresis grandmembra ĉeesto de diplomatoj en la inaŭguro, inkluzive la ŝtatestron **Olafur Ragnar Grimson**. Por la kroata esperantujo gravis ke tie prezidantino de **Kroata Esperanto-Ligo Judita Rey Hudeček** transdonis al la ĝenerala direktoro de **Universala Esperanto-Asocio, Osmo Buller** kandidatigan leteron de urbestro de **Zagrebo Milan Bandić**, konforme al la konkludoj de la jarkunveno de **KEL** en **Koprivnica** 2012. Per tiu letero **Zagrebo** kandidatiĝas por fariĝi gastiganto de **Universala Esperanto-Kongreso** en la estontaj jaroj. Por kiu jaro kandidatas Zagrebo? Ni ne precizigas. En la jaro 2014 **Universala Kongreson de Esperanto** gastigos **Bonaero** en **Argentino**. En la jaro 2015 la gastiganto estos **Lille** en **Francio**, omaĝe al la proksima **Boulogne-sur-mer**, kie esperantistoj kongresis la unuan fojon en 1905.

La kandidatoj por kongreso post la jaro 2015 estas interesaj urboj **San Francisco, Seulo, Lisabono**... Ni atendas decidojn de la estraro de **UEA**. Kontrolo de proponoj kaj kondiĉoj kiujn prezentas kandidataj urboj decidis estontece pri tiu kiuj urboj fariĝos kongresaj urboj post 2015. Legu pli pri la temo ĉi-numere.

Ekde la **Universala Kongreso de Esperanto** en **Rejkjaviko** **Universala Esperanto-Asocio** havas novan prezidanton, **d-ron Mark Fettes**, universitatano profesoron el **Kanado**.

En **Esperanto-urbo Herzberg** okaze de la tiea **ILEI-konferenco** prezidantino de **Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto Marija Jerković** enmanigis al prezidantino de **ILEI Mireille Grosjean** inviton por gastigo de **ILEI-konferenco** en **Kroatio**. **Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj kaj Dokumenta Esperanto-Centro Đurđevac** estas la kuninvitantoj.

Dinko Matković el **Hvar** prezentis dum **SAT-kongreso** en **Madrido** sian libron **333 cerbaj impulsoj**. La kongreso okazis de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 2013.

Kroata unuiĝo de nevidantaj esperantistoj – KUNE, kunlabore kun **Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj** eldonis libron **Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić** en surbendigita formo en Esperanto. Voĉlegas **Spomenka Štimec**. La kompaktdisko de la

esperantlingva **Hlapić** estis prezentita en **Obzor**, en **Bulgario** okaze de la **Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj** (la 28an de aŭgusto - la 3an de septembro 2013). **Antun Kovač** prelegis dum la kongreso pri la temo **Ĉu la kroataj nevidantaj estas egalrajtaj civitanoj?** Kunkongresis kun li **Dragan Stoković** el **KUNE, Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj**, dank' al la subvencio de **Ministerio pri kulturo**.

Dum ni kongresis eksterlande, la 23an de julio 2013 mortis en **Pula** honora membro de **UEA** kaj de **Kroata Esperanto-Ligo D-ro Ivo Borovečki**. De li adiaŭas nome de ni ĉiuj **Lucija Borčić** lia fidela amikino, per poemo kaj la adiaŭa artikolo, publikigita en **Glas Istre**.

La plej impona somera aranĝo enlanda okazis sur la insulo **Prvić**, organizita de **Josip Pleadin** kaj **Dokumenta Esperanto-Centro. Davor Grgat** raportas pri la sukcesa somerumado, kiu celas revivigi somerajn etosojn de la iama **Primošten**.

Esperanto-Societo Sisak kunlabore kun **Esperanto-Societo „Viktor Mihovilić“** el **Karlovac** kaj **Esperanto-Societo „Mondo Paca“** el **Velika Gorica** organizis la **5-an Boatadon sur la rivero Kupa**.

Multaj someraj gastoj vizitis nin en diversaj urboj. La plej belan surprizon eksterlandan faris al ni individua membro el **Varaždín**, studentino **Petra Pajtak**, kiu en **Kioto** gajnis oran medalon en **Olimpikoj pri geografio**. Koran gratulon al **Petra!**

Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio kaj **Akademio Literatura de Esperanto** finance helpis organizi la **11an Renkontiĝon de verkistoj kaj tradukistoj** la 13an ĝis la 15an de septembro en **Hraščina**. **Departamento Krapinsko-zagorska** financis al **Esperanto-Societo Trixini** el **Hraščina** kreon de tiu ĉi numero de **Tempo** per 2.000 kn. Unu el la subvenciantoj estis **Akademio Literatura de Esperanto**. Ni havas devon prezenti prelegojn de la **Renkontiĝo de verkistoj** en presita formo. Sur la sekvaj paĝoj vi trovos artikolojn de **Achtar Etemadi** el **Teherano**. Persa tradukistino festis kun ni centjariĝon de la libro **Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić** de **Ivana Brlić-Mažuranić**. **Zlatoje Martinov** prezentis pri **Julia Sigmond** kaj **Filipo Franceschi**, verkanta sub la pseudonimo **Sen Rodin**. Vi legos recenzon pri la poemaro de **Josip Pleadin Cigna kanto**, prezentita de **Zdravko Seleš**. **Julia Sigmond** kontribuis per sia poemo **Dialogo**. Saksophone muzikis **Denis Tišljar**. **Veronika Poór**, membro de konsilio de **UEA**, kaj estrano de **TEJO**, plerigis al kelkaj junaj kroataj esperantistoj. Italaj gejunuloj **Michele Cherchi Palmiere** kaj **Alessandra Squarconi** filmis la aranĝon.

Post la verkista aranĝo **Achtar Etemadi** prelegis ĉe **Kroata Fervojista Esperanto-Asocio** kaj **Veronika Poór** estis gasto de **Đivo Pulitika** kaj **Studenta Esperanto-Klubo**. **Achtar Etemadi** vizitis ekspozicion pri **Hlapić** en **Nacia kaj universitata biblioteko**, kie ŝi plezure renkontis ankaŭ sian persan eldonon de **Hlapić**.

Tihomir Engler, esperantisto el **Varaždín**, dum la **Renkontiĝo de verkistoj** transprenis por la revuo **Libri et liberi**, (en kiu li estas membro de la redakcio), ampleksan artikolon pri **Hlapić** por diskonigi Esperanton kiel lingvan ponton kaj ĝiajn meritojn por la kroata kulturo.

Rijeka viglas okaze de preparoj por la kongreso de **Eŭropa Esperanto-Unio** en **Kroatio 2014**. Membroj de **LKK** kun **Maja Tišljar** kunsidis kun pluraj decidpovaj oficistoj en la urbo kaj departemento **Rijeka** dum septembro.

Dum tri septembraj semajnfinoj sinsekve okazadis Esperanto-aranĝoj en diversaj partoj de **Kroatio**. Post **Renkontiĝo de verkistoj** kroataj esperantistoj direktiĝis al **Bjelovar** kaj poste al **Slavonio**.

Bjelovar okaze de la Tagoj de sia urbo okazigis tritagatan kulturalan programon kun sepdeko da partoprenantoj kun tri ekspozicioj kaj deklamkonkurso por gelernantoj. Elstaris ekspozicio de korea pentristo **Ho Song**. Ĉi-numere ni presas fotojn de prestiĝa fotisto **Berislav Rubčić** pri la temo **Montetoj de Zagorje**.

Vanja Radovanović kaj **Višnja Branković** estis la organizantoj de la septembra **Montkabana Renkontiĝo** en **Slavonio**, en **Jankovac** de la 24a ĝis la 29a de septembro.

Spomenka Štimec prelegis la 3an de oktobro pri **Hlapić** en urba biblioteko **Vladimir Nazor** en **Zagrebo**, kie **Darinka Sović** organizis ekspozicion de la titolpaĝoj de diversaj eldonoj de **Hlapić** eldonitaj per **Esperanto**. Samtage **Teatro Trešnja** en **Zagrebo** gastigis **Spomenka Štimec** por prelegi pri **Hlapić** en **Azio** kadre de la naskiĝtaga festo de **Hlapić**.

En novembro **Esperanto-Societo Sisak** lanĉos libron de **Marija Horžinek**, konata esperantistino el **Petrinja**.

La 11an de novembro 2013 **Urba biblioteko** en **Križevci** invitas **Spomenka Štimec** prelegi okaze de la *monato de la libro* pri tradukoj de **Hlapić** en **Azio**.

Esperanto-Societo Tibor Sekelj komencis sian duan laboraron per merkredaj prelegoj. **Zlatko Tišljar** estis la unua preleganto en la aŭtuna sezono, kun la temo **Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio** en **Rijeka**. La aliĝilon por **Rijeka** vi trovos aldone.

Esperanto-Societo „Trixini“ el **Hraščina** ricevis financon helpon de **Departamento Krapinsko-zagorska** por eldono de manuskripto **Notoj pri Hraščina** de **Stefanija Bernas-Belošević**. Por esploralaboraĵo de la teksto **Mateja Žugec** el **Hraščina** ricevis premion de rektoro en 2013.

Judita Rey Hudeček ekgvidis ekde oktobro **Esperanto-kurson** en la **Elementa lernejo Retkovec** en **Zagrebo**.

Okaze de la nova sezono, ni farbis en oktobro du el niaj ejoj en **Vodnikova 9**. Bonvolu vidi kiel progresas repagado de la kreditoj en la koncerna paĝo pri **Vodnikova 9**. Multan dankon pro via helpo al **Vodnikova 9** tra la pasintaj 11 jaroj.

Ni ne trovis ankoraŭ ĉiujn financajn rimedojn por la venontaj numeroj de **Tempo**. Ĝia estonteco dependas de vi. Multan dankon pro via subteno al **Tempo** tra la pasintaj 32 jaroj.

S. Štimec

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvarfoje jare. Jaro XXXII, numero 119 (2/2013).

ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de **Departamento Krapinsko-zagorska al Esperanto-Societo „Trixini“**

Hraščina. Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj. Voĉlegas Spomenka Štimec.

Redakcio/Uredništvo; Eldonisto/Izdavaĉ: Hrvatski savez za esperanto/Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11/III, HR 10000 Zagreb, Kroatio, tel. +385 (1) 4617550, fakso +385 (1) 4619373, esperanto@zg.t-com.hr, www.esperanto.hr, IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

Kontribuis: Mea Bombardelli, Lucija Borčić, Nataša Dorosulić, Achtar Etemadi, Davor Grgat, Glas Istre/Voĉo de Istrio, Davor Klobučar, Jožo Lović, Anto Mlinar, Nacionalna zaklada za razvoj civilnog društva/Nacia fondaĵo por evoluo de civila socio, Josip Pleadin, Freša Maro, Zlatoje Martinov, Seán Ó Ryan, Vanja Radovanović, Berislav Rubčić, Julia Sigmond, Shi Cheng Tai, Zdravko Seleš, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec, Maja Tišljar, Zlatko Tišljar, Turistička zajednica grada Zagreba/Turisma asocio de la urbo Zagrebo, Francisco L. Veuthey.

Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafike aranĝis:** Ivan Špoljarec. **Presis:** Urednik d.o.o., Zagreb

Anonartarifo: 1/1 paĝo 1000 kn (135 eŭroj), 1/2 paĝo 500 kn (68 eŭroj), lasta titolpaĝo 2500 kn (328 eŭroj). **Abono** por kvar numeroj jare 60 kn. Por eksterlando 10 eŭroj. Unuopa numero enlande 15 kn, eksterlande 3 eŭroj.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Kongreso en Rejkjaviko

La Zagreba Urbestro invitas Universalan Kongreson al Zagrebo

Dudeko da kroataj esperantistoj en **Islando** partoprenis julie **Universalan Kongreson de Esperanto** dum kiu **Kroatio** prezentis sian kandidatigan leteron por estonta gastigo de **Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo**.

Urbestro de Zagrebo **Milan Bandić** sendis al **Kroata Esperanto-Ligo** sian inviton per kiu li proponas favorajn kondiĉojn al Kroata Esperanto-Ligo por iu el la estontaj Universalaj Kongresoj post la jaro 2015. Zagrebo ankoraŭ ne havas adekvatan kongresejon. En 2001 Zagrebo same ne havis adekvatan kongresejon. Ni kombinis en 2001 koncertejon kun la ejoj de Fakultato por elektrotekniko kaj komputado. Pro manko de adekvata ejo, Zagrebo devas logi per io alia. Per kio? KEL demandis al la urbestro ĉu li emus allogi kongresanojn al Kroatio per speciala propono? Kion proponas la urbestro por la kongreso en la kroata ĉefurbo?

Li proponis en sia letero ke la UK dum unu tago senpage uzu **la koncertejon Vatroslav Lisinski**. (Ni petis ke li permesu la senpagan uzon de tiu ejo kun la senpaga uzo de la teknikaj ekipaĵoj kaj teknikistoj, sed lia letero tion ne menciis.) La letero de la urbestro enhavas ankaŭ informon ke la kongresanoj dum la kongresa semajno veturu senpage en urbaj transportiloj. Veturado dum la kongresa semajno en la kongresa urbo prezentas gravan finanĉan ŝarĝon por la kongresanoj...

La kandidatiga letero kun tiuj kondiĉoj estis transdonita al la ĝenerala direktoro de **Universala Esperanto-Asocio Osmo Buller**. Dum la kongreso en **Rejkjaviko**, kadre de la programo **Movada Foiro** estis prezentita la nova urboprospekto pri **Zagrebo** kiun en Esperanto eldonis **Turisma asocio de Zagrebo**. La asocio ebligis la partoprenon de prezidantino **Judita Rey Hudeček**.

*Zagreba ĵurnalistino Tomislav Radić informadis al Kroata Radio pri la eventoj dum UK en Rejkjaviko.
Sur la foto de S. Štimec Radić intervjuas Stanon Marček, la redaktoron de Esperanto-Revuo.*



*D-ro Probal Dasgupta, la eksa prezidanto de UEA, kontribuis en Rejkjaviko al la programo pri „Hlapić”.
Sur la foto kun S. Štimec kaj japana esperantistino*

Spomenka Štimec kun **Probal Dasgupta**, la eksa prezidanto de UEA, okazigis en libroservo aŭtoran duonhoron kaj prezentis programeron **Infanlibro Hlapić en Azio**. Tiun programeron finance subtenis **Ministerio pri kulturo kaj Nacia fondaĵo por evoluo de civila socio**. Pri la programo raportis **Kongresa Kuriero Aŭroro**.

S. Štimec



[] **Nacionalna
zaklada za
razvoj
civilnoga
društva**

Bonvenon al Rijeka



La 10a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio 6-12a de junio 2014

**Kongresa temo:
Justa Eŭropo kaj justaj lingvaj rilatoj,
malmulte kosta demokratia komunikado**

Elkore mi invitas vin al la 10-a kongreso de EEU en **Rijeka, Kroatio**, kiu okazos de la 6-a ĝis la 12-a de julio 2014. **Kroatio** estas la plej nova membroŝtato de **EU** kaj havas verŝajne la plej fortan tradicion de Esperanto inter ĉiuj EU membroŝtatoj. La jugoslavia eksprezidanto **Tito**, kroato, parolis Esperanton, kaj akceptis esperantistan delegacion dum UK-on en **Zagrebo** en 1953 kaj kroata ŝtatprezidanto **Stjepan Mesić** aŭspiciis UK-on en **Zagrebo** en 2001. En **Kroatio** esperantistiĝis esperantistaj famuloj kiel **Ivo Lapenna** kaj **Tibor Sekelj** kaj de tie devenas multaj aliaj gravaj agantoj por la internacia E-movado. De tie devenas **Zagreba Metodo** de instruado de Esperanto, 90% de teatraj aktivadoj en Esperanto kaj granda daŭra informado pri Esperanto al la ĝenerala publiko.

Krom tio atendas vin viglaj diskutoj pri la plej efika maniero antaŭenigi Esperanton en la 28 membroŝtatoj de **EU**. Dum 2013 en **Bruselo** estis interesa ekspozicio fikcia pri la eksplodo de EU en 2018 kun subtitolo "La Lastaj Jaroj de la Longa Paco 1945-2018". Kvankam la flandra artisto kiu konceptis kaj preparis la ekspozicion, **Thomas**

Bellinck, estas neesperantisto, la ĉefa lingvo de ĝi estis Esperanto. Ĝia ideo estis ke **EU** eksplodis ĉar la junularo, kiu eĉ ne povis imagi militon en **Eŭropo**, pli kaj pli voĉdonis por ekstremaj naciistaj partioj, kiuj tiris **Eŭropon** en novan grandan militon. Post tiu milito, pli da homoj fine komprenis la neceson de politika integriĝo en **Eŭropo**, kaj de neŭtrala lingvo por finfine garantii la pacon. Pensiga ekspozicio por sproni viglan debaton dum la kongreso en **Rijeka!**

Atendas vin aro da kulturaj programeroj en la bela ĉemara urbo **Rijeka** kiel teatraj spektakloj, koncertoj, poeziaj vesperoj, libreprezentoj. Kompreneble en tia bela ĉirkaŭaĵo, en unu el la plej famaj turismaj regionoj de **Kroatio**, atendas vin ankaŭ pluraj ekskursoj, ĉemaraĵoj kaj montaraj.

Venu kaj kontribuu, ĝuu kaj lernu!

Seán Ó Riain
prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio



Aliĝkotizoj por kroatoj

Ĝis la 31a de decembro 2013: 70 eŭroj
Ĝis la 31a de marto 2014: 90 eŭroj
Post la 31a de marto 2014: 110 eŭroj

Kroataj esperantistoj bonvolu pagi sian kotizon por EEU Rijeka al Esperanto Societo en Rijeka per la jena IBAN-konto: HR7524020061100212739. Bonvolu kalkuli kunaan valoron de eŭroj laŭ la dato de la pago per kurzo de Hrvatska narodna banka.

Detaloj: www.europo.eu
<http://eeu-kongreso.webnode.com/>

Kunsido de LKK

La 17-an de septembro okazis en **Rijeka** la unua kunsido de Loka Kongresa Komitato en kiu oni elektis sinjoron **Boris Di Costanzo** kiel prezidanton. Samtage okazis vizito de la delegitaro de la Komitato (**Zlatko Tišljar** kaj **Maja Tišljar** kaj **Boris Di Costanzo**) al la reprezentanto de la **Primorsko-Goranska regiono** en kiu estas ankaŭ **Rijeka**, sinjoro **Gianni Juras**. En la interparolo li proponis tuj sendi monpetojn al la Regiona Konkurso kaj poste en komenco de 2014 peti pri aŭspicio.

Maja Tišljar



Fotis Zlatko Tišljar

Persa eldonejo de “Hlapić”

La libro **Mirindaj Aventuroj de Metillernato Hlapić** de **Ivana Brlić-Mažuranić** estis eldonita en persa, je la jaro 2005 en **Teherano** en 10000 ekzempleroj pere de **Kanoon-e Parvaresh-e Fekri-e Koodakan va Nojavanan**, pli konata kiel **Kanoon**. Signifo de la nomo estas Instituto por Disvolvado de Infanaj kaj Junulaj pensmanieroj.

Kanoon estas aŭtoritata eldonejo en Irano kaj ĝia nomo estas konata por infanoj kiuj iras al lernejo.

Estas preskaŭ kvindek jaroj ke iranaj infanoj kaj junuloj en diversaj urboj de **Irano** iras al bibliotekoj de **Kanoon**, kie libroj estas pruntedonataj.

Ili laŭ siaj aĝoj kaj aĝ-grupoj povas legi rakontojn kaj artikolojn, aŭ partopreni en programoj kiel: rakontadi, legi poezion, pup-teatri, rigardi filmojn, prepari surmurajn paperojn, desegni, ceramik-faradi, glubildi, aktivi en liberaj konversaciaj rondoj kaj...

Historio de “Kanoon”

Instituto por Disvolvado de Infanaj kaj Junulaj pensmanieroj estis establita en 1961, kies estro estis tiama Reĝino Farah Pahlavi (edzino de la tiama Reĝo de Irano).

Unua libro eldonita per **Kanoon** estis “Filino de Maro” fare de Farah Pahlavi.

Ankaŭ unua libroservo de **Kanoon** estis malfermita en 1961 ĉe la parko nomita Lalah kaj poste kelkaj fiksjaj kaj moveblaj bibliotekoj estis malfermitaj en **Teherano** kaj aliaj urboj.

Nuntempe la plej vasta reto de libroservoj por infanoj kaj junuloj, apartenas al **Kanoon**.

Nun ĝi subtenas pli ol 850 fiksjaj kaj moveblaj kulturaj centroj (kaj urbaj kaj vilaĝaj). Preskaŭ 2000 trejnistoj kaj libroservist/inoj laboras en diversaj libroservoj tra **Irano**.

Preskaŭ 40 kulturaj aŭ artaj agoj estas farataj en diversaj centroj de **Kanoon**.

Kanoon estas unu le la plej elstaraj kaj ĉefaj eldonejoj en Irano. Ĝi eldonas pli ol 3 milionoj da ekzempleroj de libroj ĉiujare.

Libroj eldonitaj pere de **Kanoon** gajnis multajn premiojn el libroekspozicioj de diversaj organizaĵoj kaj landoj kiel: Unesko-premion, Bolonjo-premion, Premion de Bratislavo, Premion de la Fako de japanaj presistoj kaj la Premion de la Infanlibra Konsilio de Irano. Antaŭ revolucio la administrado de **Kanoon** estis farita tra Estraro kaj la ĝenerala direktoro, sed post revolucio kaj ekde 1979, statuto de **Kanoon** ŝanĝiĝis. Nun la Ministro de Edukado direktas **Kanoon**-on. La aktivecoj de **Kanoon** ne estas limigita al libroj kaj bibliotekaj agadoj.

Kanoon ankaŭ estas aktiva en kampoj de infana teatraĵo, film-farado, lingva instraŭdo, produktado de ludiloj kaj preparado de komputilaj programoj.

Kinaj aktivadoj de Kanoon

Kina centro nome **Kanoon** estis establita en 1967, kie reĝisoroj kaj junaj direktoroj faras filmojn por infanoj. Tiuj filmoj estis montritaj en internaciaj kaj



Sur la foto de Davor Klobučar:
*Achtar Etemadi kun Tihomir Engler, redakciano de la revuo
Libri et Liberi*

naciaj filmo-festivaloj kaj kelkfoje ricevis premiojn.

Kelkaj gravaj iranaj reĝisoroj komencis sian profesian agadon en **Kanoon**, ekzemple Abbas **Kiarostami** kiu nuntempe havas internacian reputacion. Mallongaj kaj dokumentaj filmoj ankaŭ estas faritaj en **Kanoon**.

Kanoon ankaŭ organizas kaj direktas Infanajn film-festivalojn.

Teatraj aktivecoj de Kanoon

Centro por produkti teatraĵojn kaj pupateatraĵojn komencis sian aktivecon en 1968, kaj ekde tiam, plenumas multajn infanajn teatraĵojn kaj pupateatraĵojn por infanoj.

Centro de Fremdaj Lingvoj

Kanoon havas centrojn en tuta Irano, kie oni instruas fremdajn lingvojn inkluzive anglan, germanan, francan, hispanan kaj araban.

Produktado de ludiloj kaj edukaj programoj komputilaj

Aliaj produktaĵoj de **Kanoon** inkluzivas muzikajn KD-ojn, ludilojn kaj komputilajn programojn kiuj vendiĝas en libroservoj de **Kanoon**.

Kanoon organizas festivalon “Unu semajno kun Kanoon”. Tiam okazas rakontado, pupoteatraĵoj, prezento de infana literaturo. En tiu festivalo partoprenas multaj infanoj kaj junuloj. Ankaŭ internacia festivalo por animitaj filmoj (desegnitaj filmoj) okazas dum la sama okazaĵo.

Honoroj al Kanoon

Kanoon sukcesis gajni premiojn por la filmo nomita **Infanoj de Ĉielo** kiu estis nomumita kiel “bona fremda filmo” flanke de Oskar-premio en 1999.

Achtar Etemadi

La literatura kreado de Julia Sigmund kaj Sen Rodin

Ĉiu spirita produkto, ĉiu artaĵo, stimulas la deziron ekscii ion novan. Ĝi montriĝas kiel unika, neripetebla fenomeno, kaj se ni volas ĝin ververe tutkompreni, ni devas profunde eniri en ĝian karakterizon, ĝian esencon, ni devas kompreni la fortojn kiuj en ĝi ricevis la formon, samkiel kompreni la leĝojn laŭ kiuj la spirita produkto ekestis.

Sciante la fakton ke ĉiu arta verko, artaĵo fakte, estas unika kosmo, tia tasko neniam povas esti ĝisfine kaj por ĉiam solvita, ĝi ĉiam ŝajnas kiel io nova, provoka, kiu allogas nin al la novaj esploroj.

Se tiel, estas ege malfacile en mallonga prelego, prelegeto eĉ, klarigi kaj ekspliki tutan artan laboron de iu artisto, verkisto ekzemple. En nia kazo ni havas du verkistojn (verkistino kaj verkiston) geedzan kaj literaturan paron **Julia Sigmund** kaj **Sen Rodin**.

Tial mi elektis du iliajn verkojn por almenaŭ kurte reprezenti la verkistan geon: *Bildoj pri norda lando* de **Sen Rodin** kaj *Nomoj kaj sortoj* de **Julia Sigmund**.

Ĉar ili du ĉiu aparte verkis sufiĉe da verkoj, jen mi antaŭe menciis la plej gravajn:

Julia Sigmund MI NE ESTAS MONA LIZA, rakontoj, KIAM MI ESTIS LA PLEJ FELIĈA EN LA VIVO? (intervjuoj kun amikoj), NOMOJ KAJ SORTOJ rakontoj, DIALOGO (originala poemo kaj 52 tradukoj, NOVAJ FABELOJ PRI URSIDO PU KAJ PORKETO, 12 fabeloj (kompaktdisko)

Sen Rodin: *BILDOJ PRI NORDA LANDO* kaj *aliaj rakontoj*, *CARMEN CASSINIS: VIVOVERO DE VIRINO* memoraĵoj pri patrino (1895-1920), elitaligis Filippo Franceschi, *NU, KAJ DO*, Rakontoj, Raportoj, Recenzoj, Revoj, *KAPITALISMO - lasta akto* (eseo)

kaj laste la **komunan** romanon *LIBAZAR' KAJ TERO* ("kvarmana kaj dutonala")

Julia Sigmund prezentiĝis al la esperanta literatura publiko kiel novelistino. En la Belartaj konkursoj de UEA ŝi gajnis diversajn premiojn, en la jaro 2000 la unuan. En la jaro 2001 aperis ŝia unua libro *Mi ne estas Mona Lisa*, kaj dek jarojn poste la dua novelaro sub titolo *Nomoj kaj sortoj*. Oni kompreneble devas menciigi ŝian traduklibron titolita *Dialogo*, kun 52 en Esperanton tradukitaj poemoj en kiu enestas unu ŝia originale esperantlingve verkita poemo.

Ŝiaj rakontoj ĝenerale bildigas la vivojn kaj sortojn de diversaj personoj el ŝia medio, multaj inter la rakontoj ne estas pura literatura fikcio sed, laŭ la aserto de la aŭtorino mem, ili havas realan fundamenton. La titolo *Nomoj kaj sortoj* jam parolas por si mem. La kolekto konsistas el 12 noveletoj, tre simpatiaj, kurtaj kaj tre legindaj. La plej dramatika kaj trista estas novelo *Adela* pri la 14-jara knabino kiun perfortas ŝia duonpatro kaj ŝi gravediĝas. Ŝia tuta vivo fariĝis vera infero kaj ŝia sorto estas tre malgaja. La fenomeno "graveda junulino" ripetigis kelkfoje en la rakontoj de **Julia Sigmund** kiel ekzemple en tiu sub titolo *Florika*. Sed la plej kvalita estas novelo *Marioara*. Senpretenda, simpla, sed animplena, ĝi rakontas pri analfabeta, ŝimplanima kamparanino kiu scipovas nek skribi nek legi. Ŝi venis banlokon por kuraci la reumon kaj ĉiu el bangastoj ricevas leterojn de siaj parencoj, nur ŝi ne. Tial ŝia bonkora samĉambranino instruas ŝin skribi. Post certa tempo ŝi ellernis ĉiujn literojn, kaj skribis al sia filino la unuan leteron en la tuta vivo. Ricevinte la leteron de la filino, ŝia feliĉo estis enorma. Kortuŝa kaj leginda noveleto ĉiukaze. Same kortuŝa estas mallonga novelo *Viola*, pri la bebo kiu dum la milita elmigro de ŝiaj gepatroj ŝajnis kvazaŭ mortinta en iu vagono, oni eĉ komencis fosi tombon

por ŝi, kaj subite ŝi malfermis la okulojn kaj ekridetis al la fosintoj. Kaj multajn jarojn poste kiel jam 65-jara virino, ŝi volonte ripetas: Mi estas kondamnita je vivo!

Oni povas fine konkludi ke la noveloj de **Julia Sigmund** estiĝis el la vivo mem kaj la aŭtorino nur beletre igas iliajn formojn. La stilo estas simpla, sen ajnaj ornamaĵoj, la lingvaĵo estas korekta, plejparte en la spirito de la internacia lingvo, kun kelkaj "rumanismaj" esceptoj.

Sed kiam leganto manprenas la kolekton *Bildoj pri norda lando* de **Sen Rodin**, subite komprenas ke antaŭ si li havas seriozan, profundan, ververan literaturiston, talentulon, kiu konas kaj absolute regas la leĝojn de la literatura kreado. Liaj noveloj estas interesaj ne nur pro la senpera eldirita amo pri la norda lando (fakte **Svedujo**) en kiu li unu jaron vivis kaj kiun priskribas, nek pro erupcie eldirita doloro kiam ĝin foriras, sed antaŭ ĉio pro la neordinara literatura strukturo kaj la lingvaj novaĵoj kiujn li enkondukas en la tekston. Lia poetika esprimo estas densa, reliefa; la bildoj el la aŭtentika realo estas lerte kaj sperte transponitaj en la literaturan tekston. **Sen Rodin** estas sendube erudito, atentema observanto al kiu nek unu viv- kaj hom-ero el la fora norda lando elglitas el la verkanta mano. Li montris ĝuste eksterordinaran sencon por detalo, por detaligi la fenomenon observantan, kaj tio ĉi liajn novelojn faras lingve kaj stile tavoloceaj. Lia lingvo, aŭ pli bone dirite lia lingvaĵo, same en la laŭvorta kaj normativa senco estas ege disbranĉita, en la vera esperanta esprimmaniero. **Sen Rodin**, per akto de sia kreiveco, tra lingvo-densejo serĉis la novajn kaj esprimivajn vortojn. Kaj li plej ofte eltrovis, eĉ inventis ilin. Sed vere leginte liajn novelojn, krom la interesa temo oni restas ravitaj pro lia arto uzi ĉiujn evolueblecojn de lingvo Esperanto. (Ofte oni haltas kun forta deziro noti la ĵus tralegitan vorton, por alproprigi ĝin en la mensa lingvotrezoro).



Sur la foto de Davor Klobuĉar: Julia Sigmund, Sen Rodin kaj Zlatoje Martinov dum prezento de la libro *Bildoj el Norda Lando de Sen Rodin*

Tio ĉi indikas tre altan nivelon de la kreiva invento, veran ekflugon en la lingvo-krean aventuron, fine tio estas literatura ludo por malkovri la lingvaj semantikajn valorojn.

La kolekton oni malfacile povas rerakonti, ĉar ĝi konsistigas plej diversajn historiojn pri la homoj, eventoj, naturo de la fora norda lando. Kvankam la noveloj estas rakontitaj per t.n. tria persono (la ĉefa heroo estas juna itala studento **Vito** kiu vizitis **Svedujon**, enamiĝas al juna svedino **Kirsten**), oni facile komprenas ke plejparte temas pri la autobiografiaj rakontoj, ĉar ankaŭ juna **Sen Rodin**, la italo, fine de la kvindekaj jaroj vivis dum unu jaro en tiu norda lando. Baze havante aman kaj vojaĝpriskriban

tonon, la noveloj allogas la leganton per siaj profundaj kaj detalaj observoj kaj bildigoj de diversaj fenomenoj, objektoj, klimato, homoj kaj iliaj pensmanieroj, do, de vivo ĝenerale.

La aŭtoron simple surprizas la diferenco je mentaliteto, kutimoj kaj kulturo ĝenerale inter lia patrolando **Italujo** kaj **Svedujo**. Unuflanke, li vidis multajn ebriulojn, letargiulojn kaj homan internan solecon kaj izolecon, kaj duaflanke bone ordigitan kaj organizitan socion kun laborema loĝantaro. Kun granda simpatio la aŭtoro priskribas ĉion: la naturbelecon, labordisciplinon, interhomajn rilatojn kaj kondutojn, festadon de la kristanaj festoj sed ankaŭ festadon la Unuan de majo, tago de laboro. En tiuj priskriboj oni trovas ankaŭ la humurajn partojn en kelkaj noveloj ekzemple en noveloj *Amoro* kaj *Gasta pisado*.

En la unua ni renkontas iun sinjoron, vojaĝanan agenton kiu post longa foresto de la hejmo amaras kun sia edzino. Ĉio jam precize antaŭvidite: li ĉion faras de la naŭa kaj kvarono ĝis la naŭa dudek kvin en absoluta silento. Morgaŭ esta nova labortago kaj la sinjoro agento tuj post la amoradfino turniĝas aliflanke, estingas la litlampon kaj dolĉe ekdormas.

Sed la plej humura estas novelo *Gasta pisado*. Juna italo **Vito** ĵus finis amoradon kun sia knabino **Kirsten** kiam aŭdiĝas ektinto ĉe la enirpordo. **Kirsten** surmetas negliĝon kaj iras vidi kiu estas. Post kelkaj minutoj ŝi revenas kaj **Vito** ŝin demandas. Do, mi citu:

„Kiu..kie.. kiu estas? balbutas Vito
Mi ne scias. Persono bezonanta.
Persono? Kiu persono? Kion bezonanta?
Li bezonis piseti, diris Kerstin kun plej normala tono.
Piseti? Sed, ĉu vi konas lin? ekkriis Vito konsternita
Neniam vidita. Li pasis surstrate.
Kaj li venis ĉi tien por pisi?!
Jes, ĉu li devis pisi surstrate?
Tiam Vito sentis la neceson reordigi siajn pensojn, dum
Kerstin verŝis la bieron kaj afable proponis al li la glason.
Evidente la kutimoj estas diferencaj, li pensis. Alia lando,
alia moro.“

Tamen la kulminon de sia beletra matureco **Sen Rodin** atingis per la plej nova sciencfikcia romano *Libazar' kaj Tero*, kiu estas anoncita komuna verko de **Julia Sigmund** kaj **Sen Rodin** (kvarmana sonato, dutonala). Ne enirante en enigmon kies kontribuo al la romano estas pli granda, pli signifa, mi, kiel leganto nur scias ke temas pri eksterordinara verko en la esperanto-literaturo. Kun certeco mi povas aserti ke ĝis nun ne aperis tiaspeca, (ne tiutema!), romano kun tioma denseco, tioma tavolo, kun tiom da lingvo-stilaj ornamaĵoj kaj kun tiom da dramaj personoj (literaturaj herooj, eĉ pli ol cent!), geografiaj, historiaj kaj kvazaŭhistoriaj nocioj kaj difinoj. Mirinde ke la geaŭtoroj lerte orientiĝis en tiu ĉi literatura tumulto, en tiu ĉi abundo de diversaj informoj kaj sukcese gvidis la ĉefajn liniojn de la romana ideo, sen perdiĝi en tro multaj branĉoj. Ĉar ĉi tiu mallonga prezentado de ilia literaturkreado kaj la tempomanko ne permesas pli detale analizi la romanon (bezonataj estas monatoj por serioze tion fari) ni menciugian ĉefan mesaĝon: solidareco, homa interkomprenemo kaj paco malgraŭ ĉiuj diferencoj ĉu politikaj, religiaj aŭ naciaj.

Konklude ni diru: La esperanto-literaturo per tiu ĉi romano ricevis unu tute novan sentokapablon, novan literaturan poetikan ekflugon.

Zlatoje Martinov



Ye Junjian naskiĝis en montara vilaĝo de gubernio **Hong'an**, prov. **Hubei**, **Ĉinio**, en 1915. La infana vivo en la montara vilaĝo donis al lia verkado de romanoj kaj noveloj abundan materialon. Li studis la anglan lingvon en **Universitato Wuhan**, ekde 1932, en 1936 post diplomiĝo en la universitato, li veturis al **Japanio**, en urbo **Tokio** li instruis la anglan lingvon kaj aniĝis en Japana Esperanto-Instituto (JEI), konatiĝis kun elstaraj japanaj samideanoj, ekz. **Nakagaki Koziro** (1894-1971), **Verda Majo** (1912-1947), japana verkistino en Esperanto. Antaŭ la Evento de la 7a de Julio de 1937, la japana Tokko (sekreta polico) arestis lin pro tio, ke li estas "kun danĝera penso." Li estis forpelita el **Japanio** post la prizono de du monatoj.

Ekde 1938 li laboris en la 3a sekcio de la Milita Komitato de la Respublika Registaro, gvidata de s-ro Guo Moruo (1892-1978), response pri la propagando pri la kontraŭjapana rezistmilito de la ĉina popolo en urbo **Wuhan**, poste en urbo **Chongqing**. Dume li instruis en universitatoj kaj redaktis la anglalingvan gazeton **Ĉina Verkisto**, eldonita en **Hongkong**.

Ekde 1944 li estis engaĝita kiel propagandisto pri la ĉina rezistmilito, veturis al **Anglio**, tie aranĝite de la angla registaro, li turne prelegis tra **Anglio** pri la kontraŭfaŝista batalo de la ĉina popolo. Li studis plie en **Kolegio Kings de Cambrige** pri la angla literaturo, amikiĝis kun la familio de **J.B. Priestley**, fariĝis ano de **Bloomsbury-skolo**. Somerferie li vizitadis **Danion**, ellernis la danan lingvon, poste li el la dana originalo ĉinigi la fabelaron de **Andersen**.

En 1949 li revenis en **Ĉinion** kaj partoprenis en la socialisma konstruado de la nova registaro. Li laboris en la Fremdlingva Eldonejo, redaktis gazeton la anglalingvan **La Ĉina Literaturo**, kaj elĉinigi multajn verkojn de la ĉinaj verkistoj. Li iam instruis en universitatoj en **Pekino**.

Li estis talenta verkisto, kiu verkis en kelkaj lingvoj. Lia novelaro **Forgesitaj Homoj** en Esperanto eldoniĝis en 1938. En **Anglio** li verkis anglalingve la romanon **Montara Vilaĝo**, kiun **W. Auld** esperantigis kaj eldonis la **Ĉina Esperanto-Eldonejo**. Lia romana trilogio **La Tero** (3 volumoj) estis verkita dum 1979-1980.

Li tradukis la plenan kolekton de **Fabeloj de Andersen**, kaj preferis verki aŭ traduki verkojn de la infana literaturo, ekz. li ĉinigi libron **Mirindaj Aventuroj de Metilernanto Hlapić** de **Ivana Brlić-Mažuranić** el la angla versio, kiun eldonis **Hunan-a Infana Eldonejo** en 1982. Eĉ li mem ankaŭ verkis rakontojn aŭ fabelojn por infanoj. En 2010 la Eldonejo Universitato Qinghua en Pekino eldonis **la Plenan Verkaron de Ye Junjian**, kun 20 volumoj.

Li multfoje ĉestis UK, kontaktis kun **Julio Baghy**, posteuloj de **L. Zamenhof** (bofilino kaj nepo) k.a.

Li forpasis en 1999 pro la atako de kancero.

Lia filo, prof. **Ye Nian-xian** (1943) ankaŭ estas esperantisto, kiu prenis por si pseŭdonimon **Freŝa Maro**. Li ankoraŭ loĝas en la malnova ĉinstila domo de sia patro en Pekino. La loko fariĝas ofta renkontiĝejo de samideanoj enlandaj kaj eksterlandaj, tie ĉiam viglas la verda etoso. **Ye Nianxian** estis elektita prezidanto de Pekina Esp-Asocio, krome, li estas prezidanto de **Societo de Esperantistoj - Drinkemuloj** en **Ĉinio**, redaktas la retejon **la Vina Kulturo**.

Shi Chengtai / Freŝa Maro



Kion signifas Cigna kanto?

Josip Pleadin: „Cigna kanto“,
Grafokom, Đurđevac, 2013

Josip Pleadin, la konata esperanta aktivulo, elpaŝis ĉi-jare antaŭ la publikon per la poemaro „Cigna kanto“. En la teksteto fine de la poemaro li akcentis sian amatoran pozicion, t.e. nespertecon kaj neprecedencon de sia poemumado. Li skribis ke „Ĝia enhavo estas senpretenda poezio de amato, ekestinta en la periodo inter 2008 kaj 2012, en la momentoj de inspiro. La poemoj ĉi tie prezetitaj ne estas literaturvalore selektitaj. Ili estas verkitaj pro la propra ĝuo de la aŭtoro kaj por liaj amikoj kaj bonvolemaj legantoj. La poemaro do ne pretendas akiri mondan famon, nek poeziajn laŭrojn, nek inklinon de kritikistoj. Plejparto el la poemoj antaŭe aperis en la ĉina reta gazeto „Penseo“, en la Ipernity-paĝaro de verkinto, en „Beletra almanako“, „Tempo“, „Zagreba esperantisto“ kaj aliloke.“ Tamen, jam la lasta citita frazo diras ion alian. Preskaŭ ĉiuj aŭtoroj verkas unue por propra ĝuo, sed tamen ĉiu deziras komunikadi kun la publiko, esti legata, aŭdi iun belan vorton pri sia laboro. La ĝisnuna publikigado kaj konkursado, kio videblas el la premiitaj poemoj (la poemaron malfermas poemo *Antaŭ via foriro*, premiita dum 2010 per la dua premio en Belartaj konkursoj de UEA, poemo *Ekzistas ie kaŝita loko* samjare ricevis la trian premion kaj *Maldorme sonĝas poeto* ricevis la unuan premion por poezio en la beletra konkurso „Litera turo“ en Francio, 2011) same diras la konatan veron – ĉiu homo por sia laboro ŝatas, deziras kaj eĉ bezonas rekonon de aliaj.

La dua (aŭ la unua) akcento estas la titolo de la poemaro. Jes, la aŭtoro okupiĝas pri poezio dum kelkaj relative malfruaj jaroj de sia vivo. Plejmulto de poetoj kiujn mi konas komencis verki junaĝe, eĉ infanaĝe. Esti komencanto en aĝo de pli ol kvindek jaroj ne estas ofta afero. Sed, denove, ankaŭ tio ne estas la tuta vero. Kvankam li ne verkis poeziaĵojn anataŭe, **Pleadin** sufiĉe okupiĝis pri literaturo tradukante. Tiel la titolo signas la aŭtoran konscion pri malfrua komenco, ĉar, kvankam titolpaĝe ilustrita per bela „cignino-baletistino“ kaj per tio memoriganta pri la fama baletisto kaj ĝia beleco, la frazemo „cigna kanto“ havas ironian sencon. En ĝi videblas memironieco de la aŭtoro, kies signifon mi ne provos klarigi. Ironio povas deveni el modesteco, sed ankaŭ de falsa modesteco; ĝi ankaŭ povas esti ŝildo kontraŭ la mondo malantaŭ kiu kaŝiĝas sentema animo.

Kia poeto estas **Pleadin**? Unu poemo en la poemaro estas preskaŭ programa, laŭdanta rimon: „*Filino forta, vi rimo parnasisma, / en sisma zono eruptas via magmo. Via naskiĝo kun bruo kataklisma/ ŝprucas tra mia truita diafragmo. / Varmege brulas ĉiuj miaj angioj, / ostoj kaj karno ekbolas kaj degelas. / Vi estas brilo de poetaj korkrioj, / ju pli mi aĝas, via forto pli ŝvelas.*“ (*Forto de rimo*). En Esperantujo, kiu, estante mem juna, havas junan literaturon, rimo estas unu el gravaj elementoj de poezio, kvankam ĝenerale dum la 20-a jarcento libera verso iĝis samvalora kaj eĉ pli populara, pli moderna. Mi mem pli ŝatas poetan sencon ol rimadon, ĉar por mi tio estas kerno de poezio, kiun rimante oni povas eĉ perfidi. Tamen, bona rimo, kie ne nur akordiĝas sonoj, sed ankaŭ signifoj, povas al poemo doni efikon de poezia abundo kaj, krome, ĝi estas tradicia poezia rimedo, al kiu legantoj estas kutimiĝintaj. Do, **Pleadin** estas tradiciema poeto, kaj laŭ uzo de rimo kaj laŭ temoj, kaj, ni diru, laŭ ilia romantika traktado. Nome, plejparto el la sesdeko da poemoj en la poemaro estas – ampoemoj. Nia tarda poeto tamen komencas junaĝe, komencante – arde amante. Jes ja, parolas **Pleadin** ankaŭ pri aliaj aferoj, pri amo al hejmland (*Vallis aurea*), pri milito (*La milita, Du mortoj sur Okinavo*), serio da poemoj parolas pri poezio kaj poetoj (*Mi harakiris, jam*

menciita *Maldorme sonĝas poeto, Ho, vi, poetoj*), eĉ unu bonan poemon li verkis ludante, citante la versojn de fama Esperanta poemo. Nome, kvar strofoj de „*Elegio*“ komenciĝas per versoj de „*Aŭtuna elegio*“ de **Nikolao Kurzens**, disvolvante la saman elegian, pesimisman senton.

Sed, ni revenu al la ĉefa melodio de la poemaro – al amsopiroj. Amo kiel temo estas tradicia, ĝuste multaj junaĝe komencas poetumi pro amo, por amo kaj pri amo. La ideo kaj lingvo de la amo kaj ampoemoj de mezepokaj trobadoroj kaj memtorturanta **Petrarca**, kiuj servis al siaj damoj, siaj feinoj, ne multe ŝanĝiĝis ĝis nuntempo. La romantika versio de virino videblas ankaŭ ĉe **Pleadin**. Tamen, li estas iom pli baroka ol Petrarca, kiu amis senrezulte. **Pleadin** brulas kiel torĉo: „*Ĉu dormas vi/ aŭ sopiras mi?/ Egale mi amas vin! / En sino de via lito/ aŭ en mia sin', / vi estas aminda virin'./ Provoka ĉarmo/ kaj blanka talio.../ ĉio 'stas loga sorĉo./ Nudo subvesta/ ne estas modesta./ Mi brulas kiel torĉo.*“ Jen amsopiroj, ĉarmo kaj sorĉo, sed tamen poeto brulas pro – „nudo subvesta“. Same romantike kaj milde de la titolo kaj la komenco, aspektas la premiitaj poemoj:

„*Ie en fundo de mia koro, ekzistas eta kaŝita loko
por renkontoj, revoj kaj fantazio tute realkolora,
por arto, sopiro, mistiko kaj interkultura ŝoko,
en kiu vi belas kiel greka statuo el ŝtono marmora.*“
(*Ekzistas ie kaŝita loko*),

„*En ĉambro malluma susuras via satena noktoĉemizo.
Blanka luna lumo promenas de fenestro al pordo...
De la balkona flanko almigras freŝa helnokta brizo
Ŝipoj sirene anoncas foriron al malproksima nordo.*“
(*Antaŭ via foriro*),


sed al la fino venas ne nura amanto, sed amoranto:
„*vi portas min al stelaj altoj, kaj gvidas tra ĝarden'
en kiu audiĝas tintiloj kaj sono tranĉa de fanfar'
dum min okupiĝas ĝuosent', dum min okupas dolĉa sven'*“
(*Ekzistas ie kaŝita loko*),

„*Kaj kreskos via amo en ritmoj de valso kaj amoraj
flamaj
Per francaj kisoj kaj Kamasutraj pozoj en ĉambra izolo.*“
(*Antaŭ via foriro*).

Elemento de surprizo estas klasika literatura metodo. Ĉi tie surprizas la legantojn tio ke la romantiko estas rimedo por penetri ĝis Peneterecaj poantoj. Tiel, prekaŭ vortlude, okazas transformiĝo: de la poeto – amato, ĝis amanto, eĉ amoranto!

Zdravko Seleš

*Divo Pulitika legis el la poezio de Josip Pleadin.
Prelegis Zdravko Seleš. Fotis Davor Klobuĉar.*



Memore al D-ro Ivo Borovečki



Ivo Borovečki naskiĝis la 25an de februaro 1924 en **Karlovac**. Forpasis la 23an de julio 2013 en **Pula**.

Dum la antaŭmilitaj jaroj li aliĝis al SKOJ (Asocio de komunistaj junularo de Jugoslavio) en **Split** kaj ekde aŭgusto 1943 post la abiturienta ekzameno en klasika gimnazio en

Zagreb li partoprenis la Popolliberigan batalon. Kiel 20-jarulo li estis komandanto de la urbo Đakovo. Ĉiam kun fiero li rakontis ke lia generalo estis **Ivan Šibl**. Li diplomiĝis ĉe la Medicina fakultato en **Zagreb** en 1952 kaj specialiĝis pri radiologio en 1955 ĉe Röntgen-Instituto de la Medicina fakultato.

Ĝis la 31a de oktobro 1954 li laboris kiel specialisto-radiologo en la Instituto por radiologio kaj radio-terapio de la Medicina fakultato en **Zagreb**. Kiel specialisto-radiologo kaj ĉefo de la radiologia fako li laboris de 1956 ĝis 1960 en la malsanulejo **St. Paul** en **Addis Abeba** en **Etiopio**.

En novembro 1960 li eniris la Radiologian Servon de la Medicina Centro **Pula**. Li transprenis gvidadon de la nova Radiologia fako la 7an de marto 1961, tiutempe la nura specialisto-radiologo.

(...)

Dum 1965 kaj 1966 li laboris en la hospitalo **Parnet** en **Alĝero**, la ĉefurbo de **Alĝerio**, kiel specialisto-radiologo.

Ĉe la Röntgen-fako li laboris kontinue kiel fakestro ĝis la 31a de decembro 1984. Dum jaroj li pledis por la konstruado de la nova konstruaĵo por diagnostiko, radiologio kaj laboratorio. De la 1-a de januaro ĝis la emeritiĝo la 31an de aŭgusto 1987, li estis direktoro de la hospitala fako „Hospitalaj agadoj“.

(...)

Kiel vera intelektulo, apud sia fako li praktikis vastan kampon de interesoj, ĉe kiuj li atingis grandajn sukcesojn. Ĉio ĉi sendube fondiĝis je liaj pluraj kaj superaveraĝaj naturdotoj. Per sia inteligenteco kaj supernatura memorkapablo, oratora arto, kulturo kaj erudicio, li akiradis ĝeneralan atentemon de la aŭskultantaro.

Li estis vere libro-homo. Kiom la bretoj de lia loĝejo estis superŝutitaj per libroj, konstateblis per la aro da libroj, kiujn li poste donacis al la Universitata biblioteko. Tie estis la verkoj el historio, beletro, vojaĝkronikoj, lingvistiko, poezio.

D-ro Borovečki estis vera poligloto. Li parolis ses lingvojn kaj pasive uzis ankoraŭ tiom. Tage per sia radioricevilo li aŭskultis parolelsendojn el la tuta mondo pri ĉirkaŭ 15 lingvoj kaj li posedis registraĵojn de la parolelsendoj en ĉ. trideko da lingvoj aŭ skriboj.

Oni ankoraŭ mencias la miron de la ŝtatprotokolantoj, kiam en la aerhaveno de **Pula** li salutis la caron **Haile Selasije** en la amhara lingvo. Dum kelkaj okazoj li estis tradukanto al la ĉinaj delegitaroj kiuj vizitadis **Pula** kunlige kun la tiamaj vizitoj al la ŝipfarejo **Uljanik**, sed li bedaŭrinde neniam vizitis Ĉinion.

Li estis unu el la plej elstaraj personoj de la Esperanto-Movado. Krom pluraj altaj funkcioj en Universala Esperanto-Asocio, li estis fondinto de la esperantaj elsendoj de Radio **Zagreb** 1953 (ĉesigitaj en 1992).

Li estis prezidanto de la organiza komitato de la Universala Esperanto-Kongreso en **Zagreb** en 1953 kaj

instruis Esperanton en Ekonomia fakultato en **Zagreb**. Li estis honora membro de UEA. Pluraj el liaj samurbanoj lernis Esperanton altiritaj de lia agado kaj lia iniciato. Li tradukis la kroatan poezion al Esperanto. Dank' al lia traduko **Kaprino** de **Mate Balota** estis tradukita al pluraj mondlingvoj kaj ankaŭ al la japana.

In memoriam al **Ivo Borovečki**, kuracisto *sine conditione*, erudito kaj ĉiufanka eminentulo, devus verki pluraj personoj el lia generacio. Ni menciuj nomojn de kelkaj personoj kun kiuj li kontaktis – **Ivo Lapenna**, **Števo Julius**, **Branko Polić**, **Tibor Sekelj**, **Andrija Štampar**, **Joža Horvat** kaj aliaj.

(...)

Glas Istre / Voĉo de Istrio

La 25an de julio 2013. Esperantigis Lucija Borĉić.



D-ro Ivo Borovečki kun ĉinaj esperantistoj en Pula (1983).

D-ro Ivo Borovečki (supre maldekstre).

Fotis Ivan Špoljarec

Forpasis Ivo Borovečki

Ĉesis la vivo
de nia Borovečki Ivo,
post sepdekjara agado
en la Esperanta Movado.
Li aktivis organize, propagande,
instruante, prelegante Esperante.
Li verkis artikolojn, recenzojn,
tradukis la kroatajn poezion kaj prozon.
Sed lia preferata elekto
estis tradukoj el kroataj dialektoj.
Li tradukis Krleža el la kajkava
kaj Istriaajn poetojn el la ĉakava.
Li okupiĝis pri lingvoj etaj,
nekonataj kaj minoritataj.
Preskaŭ ne ekzistis temo
al kiu ne direktiĝis lia emo,
kaj kiam li sin al io dediĉis,
li plene sin fordonis kaj feliĉis.
Sesdek jarojn ni kunlaboris,
Unu alies verkojn kontrolis.
Ivo Borovečki, la genia!
Ripozu pace, kara amiko mia!
Vi restas daŭre en nia memoro
Per via vivoverka trezoro!

Lucija Borĉić

Kelkaj esperantistoj kiuj ĉi-somere feris en la "Adriatika feriado" en **Prvić Luka**, kun nostalgio rememoris la Esperanto-kampadejon de **Primošteno**, kaj demandis sin mem kaj la organizantojn, ĉu la insulo **Prvić** fariĝis "nova Primošteno"? La situo de la insulo **Prvić** en la arkipelago de **Sibenik**, tre proksime al **Primošteno**, rememorigis nin pri la loko al kiu dum jaroj "pilgrimis" la "verda popolo". Tiu epoko vivas en la memoroj de malnovaj esperantistoj kaj diskonigis inter la novaj generacioj kiel afero nepre



Fotis Davor Grgat

ripetenda. Esperantistoj bezonas lokon por lerni Esperanton, sed ankaŭ por renkontiĝi, amuziĝi, ferii, ĝui, edukiĝi... Tial la ideoj pri somera lernejo de Esperanto okazanta en la estontaj jaroj en **Prvić Luka** estas ne nur revo de esperantistoj, sed tute reala ebleco.

"Adriatika feriado", organizita de Dokumenta Esperanto-Centro el **Đurđevac**, okazinta por la unua fojo ĉi-somere, estis malgranda sed tre internacia. Dudeko da esperantistoj venis el eĉ 12 landoj, ĉefe de Eŭropo. Kiel unu el la konkludoj, la feriantoj akcentis, ke la aranĝo meritas pli grandan atenton de la esperantistaro, ke ĝi estas aparte interesa por eksterlandanoj, kaj ke ĝi estas nesufiĉe konata kaj tre malmulte reklamita inter esperantistoj. La organizanto klarigas, ke la ĉi-jara feriado estis nur provo, sed ke la rezultoj estas kontentigaj ĉiusence. DEC jam komencis preparojn por organizi ĝin tradicie, uzante la ĉi-jarajn spertojn por plibonigi la programon kaj por venigi pli da partoprenantoj. Pri detaloj estas ankoraŭ tro frue paroli, sed oni klopodas eltrovi eblecojn ankaŭ por feriado de junaj esperantistoj je pli malaltaj prezoj, kaj samtempe trovi eblecon ankaŭ por venigi esperantistojn kiuj bezonas pli grandan komforton.

"Adriatika feriado" okazis en la Hostelo "Peski", posedata de Urbo **Đurđevac**, kiu afable invitis Dokumentan Esperanto-Centron eluzi la pli ol favorajn kondiĉojn por organizi ion el siaj programoj. Urbo **Đurđevac** tiel stimulas la aktivecojn de civitanaj asocioj registritaj en sia teritorio. Oni elektis la pintan turisman sezonon inter la 3-a kaj 10-a de aŭgusto, kio montriĝis plene trafa, ĉar la feriantoj dum la tuta semajno havis tre belan veteron, kio ebligis ankaŭ senĝenan realigon de abunda turisma programo. La feriantoj vizitis la Naciajn parkojn **Kornati** kaj **Krka** per aparte luita ŝipo, kaj la Nacian parkon Lagoj de **Plitvice** dum la revenveturado al **Zagrebo**. Interparolante kun la partoprenantoj, mi aŭdis nur laŭdojn pro la bona organizado, kiuj adresiĝas al **Josip Pleadin**, la sekretario de DEC, kiu dum pluraj monatoj intense organizis la aranĝon, klopodante plenumi ĉiujn individuajn dezirojn de aliĝintoj. Krom la turisma programo kiu allogis pej multajn aliĝintojn, abundis ankaŭ la Esperanta programo. Ĝi estis organizata sur la teraso antaŭ la hostelo, kaj tre ofte elvokis interesiĝon ankaŭ de aliĝintoj en **Prvić Luka**. Koncertis tie **Neven Mrzlečki**, estis starigita fotoekspozicio de **Ivica Šećpanović** el Braĉ, prezentigis la nova (22-a) numero de "Zagreba Esperantisto", la nova libro de **Tibor Sekelj Padma**, la eta dancistino kaj la nova poemaro de **Josip Pleadin Cigna kanto**. **Raita Pyhälä** el Finnlando interese prelegis pri finna saŭno kaj rakontis finnan legendon, okazis sinprezento de ĉiuj partoprenantoj, **Adam Wilkus** el Pollando prelegis pri **Krakovo** kaj kroataj birdoj, kaj okupiĝis pri esplorado de la kroata lingvo, **Pavel Lopatin** el Rusio prezentis sian urbon **Krasnojarskon**, kaj pri siaj Primošteno-rilataj memoroj parolis **Kerstin Rohdin** el Svedio. Estis organizita komuna vizito al la Memorcentro de **Faust Vrančić** kaj komuna ŝipa vizito al **Sibenik**, sed pluraj feriantoj mem esploris la insulon bicikle, piede kaj per kajako. Tia abundo de programoj diferencigis la esperantistojn disde aliaj grupoj kiuj antaŭe feris en la Hostelo "Peski" kaj havigis al ili la titolon "la plej bona". Menciindas, ke la grupo estis tre amikeca, kolegeca, sen disputoj kaj sen "hipoteko" portota hejmen. Ĉio ĉi fariĝis bona fundamento por reveni kaj kunferii ankaŭ en estontaj jaroj, kion pluraj jam promesis.

Evidenta estis ankaŭ la granda interesiĝo de amaskomunikiloj pri la aranĝo, ĉar aperis artikoloj en "Slobodna Dalmacija" (3), "Sibenski list" (1), "Sibenski tjednik" (1) kaj la ĵurnalistino Josipa Petrina mem venis al Prvić Luka por registri la elsendon por la unua programo de Kroata Radio, kiu estis elsendita la 10-an de aŭgusto.

Ni ekdeziru al "Adriatika feriado" ankaŭ estonte favoran venton en siaj veloj!

Davor Grgat

Ĉi jare MKR-ejo estis montkabano **Jankovac** en **Slavonio**, la plej konata ripozejo en la regiono, ene de naturparko **Papuk** kiu estas ĉefe konata pro densaj arbaroj. Al **Jankovac** alvenis 21 partoprenanto el 6 landoj por ekkoni la plej bonan de la regiono... nur, bedaŭrinde, pluvigis abunde.

Ekskursoj gvidis partoprenantojn unuatage al **Ivačka glava** (914 m), dua plej alta pinto de **Papuk**, de kie, dum bela vetero, videblas kroata ebenaĵo kaj hungaraj montetoj.

Dua ekskurso gvidis la ekskursantojn al ruinoj de fortikaĵoj **Ružica** kaj **Stari grad**, kiuj iam, dum mezepoko kaj atakoj de Turkoj, donis la sekurecon al la regiono ... Post la vizito al ruinoj estis ankaŭ vizitita pinto **Kapavac** (790 m). Bedaŭrinde, denove la pinto estis kovrita per nuboj, La marŝantoj trovis amason de fungoj kaj arbaraj beroj kaj fruktoj kaj la rikolto verŝajne estis la plej amuza parto de la ekskurso.

Spite al malbela vetero partoprenantoj ĝuis la viziton al ĝis nun nekonata regiono kaj la etoso de la grupo estis tre bona. Venontjare, por jubilea, 25-a MKR, denove surprizo estas planata... sed, pri tio, bonvolu informiĝu je MKR-retpaĝaro (<http://www.keja.hr/mkr.html>) dum marto 2014.!

Vanja Radovanović



Fotis Vanja Radovanović

DIALOGO

- Kaj se jam ĉion ni rakontis, pri kio ni parolos?
- Ĉiam ekzistos pri kio paroli.
- Kaj se ne plu estos?
- Tiam ni silentos.
- Kaj tiam ni ne plu amos unu la alian?
- Tiam ni eĉ pli amos unu la alian.
- Kaj tiam ne doloros la silento?
- La silento ne doloras, se ni amas.
- Kaj se la silento doloros?
- Tiam ni denove ekparolos.
- Kaj pri kio ni parolos?
- Pri tio, kial doloras la silento.
- Kaj tiam denove ni amos unu la alian?
- Ĉiam ni amos unu la alian.
- Kaj se ni ne scios, kial doloras la silento?
- Tiam ni kantos.
- Kaj se ni ne konas la kantojn de la alia?
- Tiam ni instruos unu la alian.
- Kaj se ni ne povos lerni ilin?
- Tiam ni aŭskultos la kantojn de la alia.
- Kaj se ni jam ne aŭdos?
- Tiam silente ni rigardos unu la alian.
- Kaj se ni ne plu vidos?
- Tiam ni prenos la manojn de la alia.
- Kaj ankaŭ tiam ni estos feliĉaj?
- Dum ni vivos, ĉar ni amas unu la alian.

Julia Sigmond

Esperantistoj el Bjelovar al sia urbo

La 22-an de septembro, kune kun kelkdeko da zagrebaj esperantistoj, mi trajnveturis al **Bjelovar** por partopreni la renkontiĝon sub nomo “Esperantistoj de **Bjelovar** al sia urbo” organizita kadre de la celebrado de la Tago de la urbo **Bjelovar**. Kvankam oni lastmomente iomete ŝanĝis la programon, mi ĝin taksas tre bona: riĉa, ampleksa kaj interesa.

Partoprenis sepdeko da esperantistoj kaj deko da bjelovaraj urbaj oficialuloj (ankaŭ ĝia urbestro **Antun Korošec**). Ni povis ĝui kelkajn ekspoziciojn, aŭdi profesoron **Zdravko Seleš** parolanta pri la forpasinta bjelovara poeto **Željko Sabol**, kiu estis ankaŭ esperantisto. Por mi aparte interesa estis la ekspozicio pri Tibor Sekelj kompletigita per la prezento de lia plej nova libro “Padma, la eta dancistino”. Sekvis deklamkonkurso por lernantoj el elementaj kaj mezaj lernejoj organizita de UPE (Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto); ĝin gvidis **Marija Jerković**, prezidantino de UPE el Zagrebo.



Tamen la plej impresa parto de la tuta programo por mi estis la prezentaĵoj dum komuna tagmanĝo en la hotelo “Central”: unue la deklamantoj el la “Deklamkonkurso” ricevis siajn premiojn, post tio per mallonga muzika programo prezentiĝis la infana grupo gvidita de instruistino **Silvija Fostač** el Zagrebo



Fotis Jozo Lovrić

kaj tiam sekvis **Josip Pleadin** kaj **Zdravko Seleš** per la libroprezento de “La Tilia Urbo” de forpasinta esperantistino **Marija Horžinek** el Petrinja. La libron tradukis **Josip Pleadin** kaj eldonis Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj. Pri aliaj eldonaj projektoj de UZE parolis ĝia prezidanto **Radenko Milošević**.

Por ĉio ĉi tio ni povas danki al bjelovaraj esperantistoj kiujn grave helpis esperantistoj el Ĝurdevac (**Josip Pleadin** kaj **Zdravko Seleš**). Multon pli pri tiu okazaĵo vi povas legi en la retejo de KEL.

Anto Mlinar

Ni planas...

... en novembro

Festo en Sisak

Popola biblioteko kaj legejo **Vlado Gotovac** en **Sisak** gastigos la 4an de novembro la aranĝon per kiu **Esperanto-Societo Sisak** festos sian 35-jariĝon. Okaze de la jubileo en **Sisak** post **Bjelovar** gastos pentrajekspozicio de korea esperantisto-pentristo **Ho Song** el **Seulo**. **Josip Pleadin** prezentos sian novan eldonaĵon, libron *La tilia urbo de aŭtorino **Marija Horžinek***. **Marija Horžinek**, instruistino el **Petrinja** dum multaj jaroj instruis Esperanton en elementa lernejo en **Petrinja** kaj informis pri la Internacia Lingvo multajn homojn de la regiono. (*Nataša Dorosulić*)

Esperanto-Societo Tibor Sekelj Zagreb

Damir Mikuličić prelegos pri *Kosmo*, la 6an de novembro 2013 je la 19 h en str. Knez Mislav 11. (*M. Bombardelli*)

Esperanto-Societo Estonteco Križevci

Por publiko de la **Urba biblioteko Franjo Marković Križevci** Esperanto-Societo Estonteco **Križevci** gastigas la 11an de novembro prelegon pri *Hlapić* en Azio. Prelegos **Spomenka Štimec**.

... en decembro

Zamenhof-tago en Komerca ĉambro en Zagrebo

Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj invitas al Zamenhof-tago al *Gospodarska komora/Komerca ĉambro* la 13an de decembro en *Draškovićeva str.*, apud Hotelo Sheraton, je la 10a horo.

Esperanto Societo Rijeka gastos en Triesto

Esperanto Societo **Rijeka** gastos okaze de Zamenhof-tago en **Triesto**, ĉe esperantistoj el **Triesto**, la 14an de decembro. En la programo estos prezento de libro *La kapreolido Pirgo* de **Anđelka Martić**, en traduko de **Josipa Katunar** el **Rijeka**.

Vodnikova 9 nia estonta ejo

672. Đivo Pulitika	14,45 eŭroj
673. Blanka Pavlović	65,70 eŭroj
674. Anto Mlinar	65,70 eŭroj
675. Stanislav Škrebec	13,14 eŭroj
676. Anonima	7,88 eŭroj
677. Davor Klobučar	26,28 eŭroj
678. Olga Štajdohar-Pađen	26,28 eŭroj
679. Darinka Sović	3,94 eŭroj
680. Spomenka Štimec	3,00 eŭroj

Inter majo kaj septembro 2013 KEL kolektis inter siaj membroj 226,36 eŭrojn.

Ekde la jaro 2003 KEL kolektis inter siaj membroj 28.170,31 eŭrojn.

Nia granda kredito de 50.500 eŭroj reduktiĝis al 8.050,48 eŭroj.

Aliaj kaj la lastaj kreditoj:

Kredito al Esperanto-Societo „Trixini“ 16.560,60 eŭroj.

Kredito al Esperanto-Societo Rijeka: 2.464,15 eŭroj.

Dankon al ĉiuj kiuj helpis al ni havi la propran Esperantejon en Zagrebo!

Nia bankkonto en Raiffeisenbanka:

Hrvatski savez za esperanto IBAN HR6124840081100881157

Memorigo:

Kiam ni aĉetis nian ejon en *Vodnikova* en 2003, ni pagis por ĝi 108.000 eŭrojn. Ni devis pagi aldone imposton de 5.000 eŭroj. Sume ni pagis 113.000 eŭrojn.

Ĉu ni translokiĝos al *Vodnikova 9* en 2014? Nun ni ankoraŭ povas uzi la ejon en *Knez Mislav 11*. Kiom longe? KEL povus uzi parton de niaj ejoj en *Vodnikova* dum la alia parto de *Vodnikova* estu loĝata, por ke ni povu pagi krediton.



La montetoj de Zagorje estis la titolo de la foto-ekspozicio de Berislav Rubčić okazigita septembre 2013 en Bjelovar, lige al la programo Bjelovaraj esperantistoj al sia urbo.